

INTERLANGUAGE



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la
ESPERANTO-ASOCIO
de NORD-AMERIKO*

NOV-DEC, 1953

Fifty Cents

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

114 West 16th Street

New York 11

N. Y.

Vol. 67

Nos. 11-12

Associate Editors: Dr. William Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Myron Mychajliw.

Sustaining Board: Portia Anderson, Dr. Luella K. Beecher, John M. Brewer, A. Chmielewicz, Sergio Docal, Preston Davis, Jr., Ernest G. Dodge, Dr. F. W. Breth, Anonymous, George Hirsch, Bertha E. Mullin, Tony Nabby, J. Louise Owens, C. D. Prewitt, Wilfrid Rouleau, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Dr. William Solzbacher, Sud-Kaliforniano, Mazah Schulz, W. E. L. Todd, Flora Wyman.

Office Assistants: Lola Mae Muse, H. S. Harris

NEW BOOK! DE LUXE! A 'MUST'!

LA NORMANDAJ RAKONTOJ

by *Guy de Maupassant*

Nineteen delightful stories from the pen of the famous rakonteur, Guy de Maupassant. Translated by Roland Dupuis into fluent Esperanto from the original French. Richly illustrated, including 8 full pages of pictures of Normandy, with historical and geographical notes. 210 pages in all, with preface and short biography of de Maupassant.

The author describes in dramatic and humorous manner the natural setting and characteristic traits of the descendents of the vikings in Normandy.


Bound in grey-brown cloth, stamped in gold
6½ X 9, 210 pages, with illustrations and colored art inserts
Postpaid \$3.60 (members deduct 10%)

Esperanto Book Service of America
114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.
Subscription rate in the United States and Canada: \$3.00 per year.

Make checks payable to the *Esperanto Association of North America*.

Patron Membership in the EANA - \$10.00 per year
Regular Membership in the EANA - \$5.00 per year
Student Membership & Armed Forces - \$3.00 per year



AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 67

NOVEMBER-DECEMBER 1953

Nos. 11-12

RECENT PUBLICATIONS IN ESPERANTO BY GOVERNMENT AND CIVIC AGENCIES

During the past year many official government and civic agencies have published folders, brochures and books in the world interlanguage Esperanto. The most recent publication is a nicely printed, illustrated, handy book, *Faktoj pri Norvegujo* (Facts about Norway), containing useful and timely details of that northern country. It was published by the largest daily newspaper in Norway "Aftenposten", and received a subvention from the Norwegian Department of Foreign Affairs.

The international exposition "Fair of Padova", Italy, printed a large colored poster with Esperanto wording, and an illustrated booklet *Padova kaj ĝia Foiro*, describing Padova and its fair.

The Brazilian Institute of Geography and Statistics, a department of the Government of Brazil, has long been active in publishing books and booklets in the interlanguage. In fact, Esperanto is by law the official auxiliary language of the Institute, and all employees are required to learn Esperanto. A beautiful book *Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo*, with full-page artistic engravings of the varied aspects and industries of Brazil was published several years ago. Recent publications are two strikingly illustrated brochures on the Brazilian cities *Recife* and *Vitória*, (Pernambuco).

In 1949, the Library of the "House of Rui Barbosa", a department of the Brazilian Ministry of Education, published a biographical account of one of the eminent figures of Brazilian history, *Dr. Rui Barbosa*. It is an imposing book of 296 pages.

Tourist agencies of the following cities have issued folders in Esperanto during the past year: *Berlin*, *Hannover* and *Nürnberg*, Germany; *Antwerp*, *Haarlem* and *Volendam*, Netherlands; *Vichy*, *Thiers* and *Mulhouse*, France; *Como*, Italy; *Trondheim* and *Bodö*, Norway; *Zagreb*, Jugoslavia; and *Valencia*, Spain. Pictured below is an assortment from these various publications — all demonstrating unmistakably *the living fact and practical use of Esperanto in the world today*.



ESPERANTO IN ACTION



"U. S. Citizens in World Affairs", a directory of non-governmental organizations recently published by the Foreign Policy Association, devotes a whole page (p. 140) to information about the Esperanto Association of North America. Our association is also listed in the voluminous handbook, "National Associations of the United States", published by the U. S. Department of Commerce. The listing appears on page 615, under "Educational, Scientific, Social Welfare, and Other Organizations."

At the University of Utrecht, Netherlands, C. A. ten Seldam obtained a doctor's degree *cum laude* in physics with a thesis on "Energies and Polarizabilities of Compressed Atoms." The 75-page thesis was in English, followed by a 7-page summary in Esperanto.

The city authorities of Constance, Germany, decided to name a street *Esperanto-Strasse*. The ceremony was held in July when guests from many countries attended an Esperanto vacation in the city.

The Italian Science Esperanto Club, with headquarters at Milan, has announced that it plans to publish interlingual terminologies for various fields of science and technology, beginning with the machine tool industry. The languages used will be Esperanto, Italian, English, German, and French. An article explaining the plan has been published in the important journal *Macchine* ("Machines").

"The Youth Sing Book", published by The Pilgrim Press, London, England, contains a number of songs in Esperanto. "Because of youth's broadening outlook and increasing international contacts," says the author, Sid. G. Hedges, "there is much singing here in French, German, Esperanto, Latin, and a little in Welsh, Italian, and Spanish."

Another postage stamp in honor of Esperanto will be issued by the Austrian Government in 1954, on the occasion of the fiftieth anniversary of the Austrian Esperanto movement, it was announced at the recent Austrian Esperanto Congress at Klagenfurt, following a communication received from the Postmaster General in Vienna. In 1953 the Yugoslav Government issued three postage stamps in honor of the Universal Esperanto Congress held at Zagreb, two for use in Yugoslavia (one 15-dinar stamp and one 300-dinar airmail stamp) and one (of 15 dinars) for use in the Yugoslav Zone of Trieste.

The Bavarian dialect is among the languages in which promotional literature for Esperanto is available. *Baierische Weltgeschichte* ("Bavarian World History"), a bestseller in Bavaria, by Michl Ehbauer, contains a humorous poem plugging Esperanto.

Important yearbooks which list the Esperanto Association of North America in their 1953 editions include "The World Almanac" (p. 582), "The New International Year Book" (pp. 159-161 and 506), and "The Funk & Wagnalls New Standard Encyclopedia Year Book" (p. 383). The New International also contains a detailed article by Dr. William Solzbacher on the progress of Esperanto during the past year.

The French Minister of Education, André Marie, has authorized the teaching of Esperanto in the elementary schools of Alsace (the Departments of Haut-Rhin and Bas-Rhin) for children who do not take German.

House Document No. 154 (83rd Congress, 1st Session), published by the United States Government Printing Office, contains the Ninth Semi-Annual Report of the U. S. Advisory Commission on Educational Exchange. The appendix reproduces excerpts from a report of the Vice Chairman of the Commission, Mr. Mark Starr, mentioning his participation in the Worker's Esperanto Congress at Düsseldorf, Germany. "Forty different countries were represented at this meeting," Mr. Starr wrote, "and my presentation consisted of detailed comparison in the auxiliary language Esperanto between the unions of Europe and those of the United States."

The Southwest German Radio Network recently broadcast a play titled "Dr. Esperanto", by Alfred Richter-Anschütz. Most of it was in German, but there were three parts in Esperanto: extracts from Goethe's "Iphigenia", the Esperanto anthem *En la mondon venis nova sento*, and a conversation at the Dresden Esperanto Congress in 1908.

The Second World Congress of Sociology, held in August and September 1953 at Liège, Belgium, under the auspices of UNESCO and the Belgian Government, listed among the institutions represented the International Commission on Esperanto and Sociology. The List of Participants included the Chairman of the Commission, Dr. William Solzbacher, of the United States, past President of the Esperanto Association of North America; at Liège he represented ASSIST (Affiliated Schools and Seminars for International Study and Training, Inc.).

At Athens, Greece, Esperanto was taught during the past academic year in fourteen public high schools, two teachers colleges, and the College of Economic and Commercial Sciences.

In the Soviet Zone of Germany, Esperanto activities are being continued by means of underground clubs and bulletins, according to an article published in the October 1953 issue of the West German journal *Esperanto-Post*. An underground newsletter named *La Verda Insulo* is in preparation. The East German Ministry of Education ordered the liquidation of all Esperanto societies because of the alleged "utilization of Esperanto clubs for cosmopolitan endeavors and for the activities of agents of American imperialism."

Sixty-three streets and squares in a number of countries are named after Dr. L. L. Zamenhof, the author of Esperanto, we learn from a recent issue of *Franca Esperantisto*. Nineteen of these are in France.

The story of how Esperanto saved his life was told by a Polish displaced person, who recently arrived in the United States, on Art Linkletter's nationwide radio program "Hollywood House Party" on October 29. During the war the Pole was held in a German prison camp. At the camp there were Italian workers who did not know German. The Germans inquired whether any of the Polish prisoners knew Italian. One of them — the one who appeared on the radio program — knew Esperanto and volunteered to translate for the Italians. Fortunately one of the Italians had studied Esperanto, so that matters worked out satisfactorily. Since Esperanto was banned in Nazi Germany, the Germans were not told that the means of communication was Esperanto, but were made to believe that the Pole knew Italian. He obtained better food and preferred treatment and thus was able to survive at a place where mortality figures were extraordinarily high.



Bildo de D-ro L.L.Zamenhof, unue presita en "AE" 1917 je lia morto.

LA SIGNIFO DE LA VERKOJ DE ZAMENHOF

Okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof – la 15-an de Decembro – ni publikigas ekstraktojn el artikolo de G. Waringhien. La artikolo troviĝas en la libro "Facilaj Esperantaj Legaĵoj" eldonita de la Esperantista Centra Librejo.

Zamenhof ne estas nur la kreinto de Esperanto: li estas ankaŭ la unua kaj ĝis nun la ĉefa esperanta verkisto. Lia grandega laboro dividiĝas en du partojn: la originalajn verkojn, kaj la tradukojn. La originalaĵoj konsistas el pluraj lingvaj aŭ religiaj traktatoj, el la ok paroladoj antaŭ la universalaj kongresoj, el multaj artikoloj kaj leteroj; sed la tradukoj estas ankoraŭ pli gravaj. Li tradukis el la literaturoj angla, dana, franca, germana, hebrea, jida, pola, rusa.

Tiun vastan laboron Zamenhof entreprenis, ĉar li klare konsciis, ke ĝi estas nepre necesa por la kresko kaj vivo de Esperanto. Li sciis, ke vivanta lingvo ne estas simpla kolekto da vortoj en pli malpli longaj listoj, kun aro de gramatikaj reguloj difinantaj la manieron de ilia kunligiĝo: tio estas ja necesa skeleto, sed nur skeleto de lingvo. Ĉar tiuj vortoj povas havi plurajn signifojn; iuj povas, en pluraj lingvoj, esti uzataj metafore kun tiu senco, en aliaj kun tiu alia senco, dum eĉ en kelkaj ili ne povas esti tiel uzataj. Mi citos nur, por klarigo, unu ekzemplon: la angla verbo *to scratch* kaj la germana *kratzen* signifas france *gratter*; sed *scratch your name* aŭ *kratzen sie Ihren Name* signifas *enskribu vian nomon*, dum la franca *grattez votre nom* signifas *forigu la enskribon de via nomo*, t.e. ĝuste la malon. Kiel do fiksi la signifojn de la esperanta *grati*? Ĉu per aparta decido de la aŭtoro de la lingvo? Sed estis al li neeble scii, ĉu la metafora signifo estas sufiĉe komprenebla de ĉiuj popoloj, ke ili konsentu ĝin: nur la uzado de la parolantoj aŭ verkistoj povis tion montri.

Oni komprenas do nun, la gravecon de la tradukoj de Zamenhof: per ili li liveris al la esperantistoj vastan materialon da vortrilatoj, radikkunmetoj, signif-nuancoj, el kiu plej granda parto estas internacie akceptebla kaj prezentas oportunan grundon por la starigo kaj fikso de la uzado. Se oni volas eviti la kaoson, oni devas akordiĝi pri tiuj lingvo-elementoj, kaj fondi sur ili la stil-unuecon, kiu estas nepre necesa en komenciĝanta literaturo. La personeco de la verkistoj povas montriĝi nur, se ĝi kontrastas sur tia unutona fono, kaj aliparte, la simplaj esperantistoj povas mastri la lingvon nur se ili ne estas ĉiunomente devigataj krei mem la rimedojn por esprimi siajn pensojn, sed disponas stokon da antaŭpretigitaj dirmanieroj. Nu, la sola maniero akiri ilin estas tiri ilin el la zamenhofa stilo, per konstanta legado de liaj verkoj. Nur per tia legado, atenta, plurfoja legado la lernanto iom post iom akiras la senton pri la karaktero aparta de nia lingvo, nur per ĝi li iom post iom ekkomprenos, kio estas tiu "spirito de la lingvo", kiun ofte aludis Zamenhof en siaj *Lingvaj Respondoj*; nur per ĝi li iom post iom kutimiĝos ne plu traduki sian penson esperanten, sed pensi rekte en Esperanto kaj uz la lingvon kiel sian propran. Mi ne volas eĉ paroli pri la belo, kiun oni povos ĝui

ĉe la renkonto kun tiuj monumentoj de la homa genio: eĉ se oni ne konsideras la kulturan profiton, kiun oni tiras el la esploro de tiuj ĉefverkoj, oni ne povas kontesti, ke la unua devo de ĉiu vera esperantisto estas zorge, preskaŭ pie legadi la verkojn de nia Majstro.

Selected List of Original and Translated Works of Zamenhof

| | |
|--|--------------------|
| <i>Originala Verkaro</i> , articles, speeches of Zamenhof, 605 pp. cloth | \$ 5.00 |
| <i>The Birth of Esperanto</i> , as told by Zamenhof, in parallel Esp-Eng. | .10 |
| <i>Kongresparoladoj I & II</i> , seven speeches by Zamenhof, 2 bks, both | .35 |
| <i>Jubilea Kongreso de Esperanto, 1912</i> , speech by Zamenhof, reports | .20 |
| <i>Leteroj de Zamenhof, Vol. I & II</i> , recent research, cloth, both for | 5.50 |
| <i>Fundamenta Krestomatio</i> , many wks of Zamenhof, paper | \$1.80, cloth 2.50 |
| <i>Ifigenio en Taŭrido, Goethe</i> (Zamenhof), easy reading myth drama | .85 |
| <i>Batalo de l'Vivo, Dickens</i> (Zamenhof), novel of English life, 128 pp. | 1.20 |
| <i>Fabeloj de Anderson III</i> , (Zamenhof), 35 famous fables, 153 pages | .95 |
| <i>Georgo Dandin, Moliere</i> (Zamenhof), light comedy of French life... | .65 |
| <i>La Rabistoj, Schiller</i> (Zamenhof), emotional tragedy of middle ages | 1.25 |
| <i>Rabeno de Baĉarab, Heine & La Gimnazio, Aljehem</i> , tr. Zamenhof | .75 |
| <i>La Sankta Biblio</i> , Old Testament (Zamenhof) & N.T., 996 pp, cloth | 2.50 |
| <i>La Revizoro, Gogol</i> (Zamenhof), farce comedy of old Russia, 100pp. | 1.00 |

EASY READER-TEXTBOOK WITH NEW "KEY" TO AID LEARNER E. G. Dodge is Author of "Learners' Aid" for Kokeny Text

Many are familiar with the "internacia gramatiko por komencantoj" — all-Esperanto text — entitled *Populara Lernolibro de Esperanto* (Kokeny). It has 40 lessons of easy reading material, each followed by a few well-chosen questions. Topics: *En la lernoĉambro. Se ni estus riĉaj. Vizito en la vilaĝo. Ĉe la kuracisto. La moderna fabriko. La vivo de Zamenhof. Korespondo per Esperanto. Vojaĝoj... Kongresoj... Literaturo...* Etc. We recommend it to beginners as a very easy "first reader" and all-Esperanto textbook, (merely noting that it was published in Budapest in 1947, and has a few socialist terms such as *kamarado, nova politiko, sovetunio*, etc. These should not trouble the intelligent and discerning student.) As an easy reader it can't be beat. And now we are supplied with a new *Learners' Aid* to make it an easy textbook.

The LEARNERS' AID (for use with *Populara Lernolibro de Esperanto*) was prepared by Ernest G. Dodge during his use of *Lernolibro* in his Esperanto classes. Kokeny states in his preface: "This textbook does not have separate grammatical clarifications... The learner should have, in addition, a KEY or similar publication." Mr. Dodge has rendered a great service to English-speaking students by preparing that "key", the new *Learners' Aid*. In combination with *Lernolibro* it makes an easy textbook for beginners. Buy the combination for self or class instruction:

| | |
|--|--------|
| <i>Populara Lernolibro de Esperanto</i> , Ludoviko Kokeny, 64 pp, paper | \$.50 |
| <i>Learners' Aid</i> (Key to Lernolibro), Ernest G. Dodge, 44 pp, mimeo | .35 |
| Both <i>Lernolibro</i> and <i>Learners' Aid</i> in combination, complete, only | .75 |

(Members of EANA deduct 10% from prices of all books listed on this page)

Order from: **Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

SEMAJNO EN BANGKOK

William P. Vathis

POR la dua fojo de post mia alveno al Hong Kong, mi havis la plezuron kaj bonŝancon fari libertempan vojaĝon. Antaŭe Japanujo estis la lando, kiu vokis min. Tiun ĉi fojon estis la antikva lando de la blankaj elefantoj, Siamo. Envere mi ne havis sufiĉan tempon por traveturi la landon kaj devis kontentiĝi per nur unusemajna restado en la konata ĉefurbo Bangkok.

Kaj refoje mi troviĝis en aeroplano, ĝuante luksan komforton inkluzive de manĝoj, legado kaj tutsimpla ripozado en refreŝiga, malvarmeta aero. Sed post kelkaj horoj de tia dolĉa vivado ni proksimiĝis al Bangkok kaj tiam mi rimarkis kiel varme fariĝis. Kaj kiam aeroplano surteriĝis kaj mi metis la piedon sur siaman teron, tiam min trafis la radioj de la vere varmega suno – ni ja estis multe pli proksime al la ekvatoro ol en Hong Kong. Tiel mi estis varme bonvenigita al Bangkok, eĉ pli varme ol mi deziris! Tamen mi decidis, ke la suno ne malbonigos mian libertempon.

La sekvontan matenon mi vekigis plena je deziro trafi la vidindaĵojn de Bangkok. Jam de la komenco mi renkontis la lingvajn malfacilaĵojn. Ŝajne la angla lingvo ne estas tiom uzata ĉi-tie, kiom oni supozas. Kaj ĉar la stratnomoj estas ĉiam skribitaj siamlingve, tio ne helpas al fremdulo. Sed tio ne haltigis promenemulon, kia mi estas. Piede mi vagis tute sen celo. Mi rimarkis multan similecon inter la stratscenoj de Bangkok kaj Hong Kong. Oni ja memoru, ke granda nombro da loĝantoj estas Ĉinoj. Pro la varmega vetero infanoj ĉirkaŭkuris tute senvestaj. La malgrandaj knabinoj ja portas malgrandan kvinangulan pecon de ŝtofo ĉirkaŭ la koksoj, kiel kovraĵon, tamen ne ĉiuj havis tiujn ornamaĵojn. Oni rakontis al mi, ke okcidentulo vidis tiun aĵon (mi ne scias kiel ĝi nomiĝas) en butikoj, kaj aĉetis unu por sia amikino. Ŝi tute senscie portis ĝin ĉirkaŭ la kolo kiel ŝalon. Imagu ŝian konsternon kiam poste ŝi vidis la ĝustan lokon por porti tiun aĵon!

Vagante, mi baldaŭ rimarkis, ke Bangkok estas transigita de multaj kanaloj. Sur tiuj kanaloj troviĝas ĉiuspecaj boatoj – de malgrandaj boatoj, entenantaj unusolan personon, ĝis sufiĉe grandaj bargoj. Ili portas multvariajn varojn – fruktojn, lignon, legomojn, kokosojn, lignokarbon ktp. Multaj el la boatoj fariĝas flosantaj hejmoj. Oni tute ne bezonas eliri por ion aĉeti, ĉar la boatoj kun ĉiuspecaj varoj venas ĝis la pordo. Kelkaj el la komercistoj en la malgrandaj boatoj uzas alvokan signalon kaj oni scias laŭ la nombro de la signaloj, aŭ voko, ke ekzemple, la viro kiu vendas kafon proksimiĝas. Kredeble la popolo multe ŝatas siajn surakvajn hejmojn, ĉu sur, ĉu laŭlonge de la kanaloj. Kaj oni uzas la akvon de la kanalo por ĉio – banado, kuirado, lavado de manĝaĵoj. Ĉiuj, homoj kaj boatoj, moviĝas malrapide. Pro kio rapidi? Ŝajne ili volas ĉion fari laŭ malstreĉa maniero -- la varmega vetero ankaŭ kondukas al tia sento. Do, la boatoj malrapide glitas kaj la vivo same sin trenas.

Oni nomas Bangkok la Venezio de la Oriento. Tamen, mi aŭdis de junulo, kiu estis en Venezio post la milito, ke tieaj kanaloj estas pitoreskaj sed malbone odoras. Miaflanke mi ne rimarkis malbonan odoron

ĉe la kanaloj de Bangkok, aŭ eble post pli ol du-jara loĝado en la oriento, mi sufiĉe al kutimiĝis al diversaj odoroj, kiuj komence iom ĝenis min.

La plej konataj vidindaĵoj de Bangkok estas kompreneble ĝiaj temploj. Ili estas multaj, eĉ tro abundaj, kaj ekzistas tiom da ili, ke multaj disfalas pro neglekto kaj ne estas riparataj. Ili estas bele kaj multkolorore ornamitaj kaj plezure oni pasigas multajn horojn rigardante ilin. En tiuj temploj troviĝas Budho-statuoĵoj. Plej ofte ili havas la kutinan sidantan pozon, sed ekzistas esceptoj kiel ekzemple, la "kuŝanta Budho."

Dimanĉe mi kaptis okazon viziti unu el la plej elstaraj temploj de Bangkok; eble unu el la plej famkonataj por Budhanoj. Ĝi nomiĝas *la Templo de la Smeralda Budho* pro tio, ke Budho-statuo estas farita

el, laŭdire, unu granda peco de smeraldo. Pli verŝajne la gemo estas jaso sed kial argumenti? Do, mi eniris "samloron", t.e. triciklon kaj post la kutima kaj necesa marĉando rilate la prezon, fine ekveturis kaj baldaŭ atingis la templon. Tuj je la eniro, oni petis, ke mi fordonu mian fotografilon, ĉar oni ne permesas la fotografadon de tiu-ĉi vidindaĵo, kvankam en ĉiuj aliaj temploj tio estas plene permesata. Postsekvinte la plej grandan homamason, mi baldaŭ trovis min antaŭ la plej granda konstruaĵo de tiu templo. Forpreninte la ŝuojn, mi eniris kaj vidis la kutiman temploscenon. Sed aldone, alte en la centro, en vitra kadro, troviĝis la bela smeralda Budho, vere bela vidindaĵo. Multe mi ĝuis la kvietan ripozadon en tiu-ĉi inspira kaj majesta loko.

Vizitante templojn, hazarde mi trafis dufoje je interesaj ceremonioj. Unufoje okazis, ke mi proksimiĝis al templo, ĉe kiu mi rimarkis aktivecon. Iom hezitinte ĉe la pordo, mi poste sidigis eksteren, sed oni rimarkis min kaj mangestis, ke mi eniru. (Ĉie, kien mi iris, min trafis ĝentila afableco kaj kora gastameco. Krome, mi vidis preskaŭ neniujn almozpetantojn). Denove mi forprenis la ŝuojn, eniris kaj sidigis. En la centro de la templo malgranda knabo, eble kvin aŭ ses jara estis la centro de la ceremonio. Mi iom cerbumis pri ĉio, sed ne devis longe resti en dubo, ĉar tiumomente alproksimiĝis al mi sinjoro, kiu iomete parolis angle – sufiĉe por komprenigi al mi, ke tie sidas lia filo, kiu pretiĝas por eniri la monakan vivon. La knabo sidis en la centro kaj sur tri flankoj de li sidis la monakoj, kiuj ĉantis. Fine oni forprenis la blankan ĉe-



mizon de la knabo, ordinaran ĉiutagan ĉemizon, kaj surmetis flavan ĉemizon sur lin (flava estas la koloro de la monakaj vestoj). Post iom da preĝado oni flankenprenis la knabon kaj post nelonge ili ĉiuj revenis kaj la knabo jam portis flavan robon, kio ŝajne signifis, ke li nun estas vera monako-novulo. Daŭris la ceremonio kaj la patro klarigis, ke la ĉefmonako deklamis la dek legojn de Budho, kaj la knabo ilin ripetis. Post iom pli da preĝado, ĉiuj, la familio kaj la monakoj festis per manĝo tiun ĉi feliĉan okazon.

La alian fojon, mi trafis funebran ceremonion. Sinjoro, kiu ankaŭ parolis iomete angle, venis renkonte al mi kaj invitis min eniri. Li klarigis, ke oni ĵus komencis diservon por lia mortinta patrino, kaj poste oni bruligos ŝin. Do, mi sidigis por rigardi kaj aŭskulti la ĉanton de eble tridek monakoj, kio faras ĝin sufiĉe granda kaj multekosta ceremonio. Tamen oni ne venis nur por preĝi, sed ankaŭ por kviete babili kaj manĝi, ĉar mi rimarkis kutiman orientan manĝaĵon kaj krome, tute okcidentajn enladigitajn fruktojn. Mi iom surprizigis, ke oni ŝajne ne funebris je tiu-ĉi okazo. La sinjoro klarigis al mi, ke jam en la pasintaj tagoj oni funebris kaj ploris. Nun estas alia afero, kaj post la ĉanto kaj manĝo, je certa horo oni bruligos la kadavron. Li montris al mi la grandan bruligejon kaj, sincerdire, mi ne volis resti por vidi tion. Do, mi foriris.

Nokte mi iris por rigardi la siaman boksadon. Ĝi diferencas de la sporto en la okcidento, ĉar aldone al la uzado de pugnoj, oni rajtas bati per la piedoj. Tio faras ĝin interesa sporto, sed ŝajne oni ne uzas la piedon kiel ĉefan batalilon por malutili al la kontraŭulo, sed por senekvilibrigi la kontraŭulon kaj tiam rapide bati per la pugno. Almenaŭ tiel ŝajnis al mi, kiu bone ĝuis la konkurson. En tiu speco de boksado oni devas esti eĉ pli rapida ol kutime, ĉar oni devas priatenti ankaŭ la piedojn. Tamen, mi rimarkis ke tiu, kiu uzas la piedojn ne ĉiam venkas, ĉar se la alia batalanto estas lerta, li povas kapti la piedon per la mano kaj la avantaĝo estas al li se li tiel konfuzos la piedbatanton.

La lasta, sed certe ne la malplej interesa vidindaĵo de Bangkok, kiun mi trafis estis vizito al la serpentbieno. Tie oni havas grandan kolekton da serpentoj, precipe la mortigajn najojn. Je fiksita horo ĉiusemajne oni eniras la serpentejon por eltiri de la serpentoj venenon. Tio estas laboro por fortnerva homo – (dankon, mi jam decidis ne forpreni de li la laboron). La doktoro kaj helpanto – ambaŭ ordinare vestitaj sed kun la granda diferenco, ke ili portas dikajn botojn – eniras tiujn verajn nestojn

de serpentoj. La helpanto portas forkoforman bastonon per kiu li kaptas la kapon de la najo, kaj tiel tenante ĝin, per la mano prenas la serpenton je la malantaŭa parto de la kapo. Dume la doktoro tenas malgrandan vitron kaj oni premas je certa loko sur la kapo de la najo, kio kaŭzas ke la veneno eligas. Post tio oni donas al la serpento iom da lakto kaj permesas al ĝi forgliti. Ja estas interesa afero kaj certe mi ne volas pliproksimiĝi al tiuj najoj – aŭ al iuj ajn aliaj serpentoj ĉion-konsiderante. *Adiaŭ al Bangkok!*



The Esperanto Association of North America

NEW AUSTRALIAN SOUND-FILM IN ESPERANTO

NOW AVAILABLE FOR CLASS AND CLUB PROGRAMS

The new beautiful Australian color and sound film with commentary in Esperanto, *AUSTRALIO HODIAŬ* (Australia Today), is now available to classes, clubs, schools, etc. This is the wonderful 16mm film, one-half hour in length, which had its premier at the 43rd Congress of EANA in New York City. It makes friends for Esperanto. It pictures, in glorious color, the scenery, the flora and fauna, the industry and culture of that unique country "down under". The Esperanto commentary is by your General Secretary. Many scenes are interspersed with music. Any 16mm projector for color and sound will show the film. The Australian Government spent thousands of dollars in the production of this film. Ordinarily they rent their films for \$7.50, but they have made a special concession to your EANA, making the rental only \$3.75, (plus one-way special low-cost postage expense at the time you return the film). Here's how to secure the film: Set a date for the showing. Then write your Central Office at earliest moment, and include the \$3.75 rental fee. First come, first served, — so don't delay.

Sukcesojn en la kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron", ni kun danko raportas por la jenaj: Ralph Williams (1), Romeo Campbell (1), Elsie Yungbans (3), Henry Kruse (1), Connie Davis (1), Ray Kelly (5), D-ro F.W. Breth (1), Espo-Klubo de Vancouver (1), Donald Hathaway (1), W. D. B. Jenkins (1).

GREETINGS FROM EANA AT CHRISTMAS AND NEW YEAR

In behalf of the Board of Directors, the Executive Committee, and the Central Office of EANA, we wish to express cordial greetings and sincere gratitude to each and every one of you during this festive season of happiness and goodwill. It is to all "members of goodwill" that the credit is due for bringing their official *Landa Asocio EANA* along the difficult road of sound growth and loyal devotion in the cause we all hold dear, since its organization in the year 1905, and its incorporation in the year 1912. Since year-end labors make it impossible to send adequate personal messages, we ask that you accept the sentiments printed below, as our personal greetings to YOU.



*Ĝojan Kristnaskon
Feliĉan Novjaron*

KIAM DISKUTAS LA AKADEMIANOJ

Myron R. Mychajliw

LA artikolo de D-ro W. Solzbacher, membro de la Akademio de Esperanto, "UNO, UNESCO kaj Esperanto-Terminologio", presita en *Amerika Esperantisto* Jan-Feb. 1953 elvokis vastan diskuton sur la paĝoj de *Esperanto* de UEA, diskuton en kiu partoprenas jam du aliaj Akademianoj kaj kelkaj "sentitolaj" lingvo-amatoroj. Oni uzis multajn argumentojn por kaj eĉ pli multe kontraŭ la formoj *Unuigitaj Nacioj*, *UNO*, *UNESCO*. Malgraŭ ĉiuj asertoj, ke "nur tiel devas esti", apelacio al logiko, fervora argumentado, multaj analogioj kaj belaj retorikaj, la afero restisne solvita, ĉar ĉiuj diskutantoj faras la saman eraron: penas solvi lingvajn problemojn de Esperanto ekster Esperanto mem, atribuas al Esperantaj vortoj signifon, kiun ili ne havas kaj aplikas malĝustajn analogiojn.

Esplorante iun lingvan fenomenon en Esperanto, la bazo de esploro devas esti Esperanto mem: ĝia fundamento, historio de la lingvo, kaj tendenco de evoluo. Oni ne povas fari konkludojn laŭ la bazo: en Esperanto devas esti tiel, ĉar en tiu aŭ alia nacia lingvo estas tiel. Farante analogiojn kun la naciaj lingvoj oni povas nur konstati, ke en Esperanto estas tiel, kaj en tiu aŭ alia nacia lingvo estas tiel. Esperanto estas nek sintezo de ĉiuj lingvoj ĝenerale, nek ombro de iu nacia lingvo speciale. Ĝi estas arbitre arte kreita lingvo kun siaj propraj reguloj kaj tendenco al evoluo, laŭ la spirito de la lingvo mem. Tial ne estas serioze, se la Akademiano pledas por la formo "*Unuigintaj*" ĉar en la turka kaj araba lingvoj ĝi estas tia.

Alia argumento de la Akademianoj, pledantaj por *Unuigintaj* estas aserto, ke la nacioj unuigis *libervole*, do *logike* devas esti *igintaj*. Sed kie sinjoroj Akademianoj trovis, ke sufikso *ig* signifas *libervolecon*, neniu klarigis. En silogismo la tria aserto (konkludo) estas vera, se la unua kaj la dua asertoj ankaŭ estas veraj. En kazo de la formo *Unuigintaj* ni povas konstati, ke la unua aserto (ke *ig* signifas *libervolecon*) ne estas vera, la dua aserto, ke la nacioj *unuigis*, ankaŭ ne estas vera, do *logike* ankaŭ tria aserto (konkludo), la nomo *Unuigintaj* ankaŭ ne estas ĝusta.

Unuigi (kunfandiĝi) signifas fariĝi unu. Se du aŭ pluraj juraj personoj unuigas, ili perdas siajn antaŭajn formojn kaj kreas novan juran personon. Ekzemple malnova UEA kaj IEL *unuigis*. Ĉesis ekzisti UEA kaj ĉesis ekzisti IEL, kaj kreiĝis nova jura persono UEA (nova UEA). *UN* estas *organizo*, bazita sur membreco. La membro-ŝtato povas aliĝi aŭ ekŝiĝi de tiu organizaĵo kaj nenion perdas pro tio de sia propreco kiel ŝtato.

Laŭ Plena Vortaro – *ig* estas "sufikso almetebla al ĉiaj radikoj, esprimanta per si mem *ŝanĝon de stato* (substreko mia), ne precizigante ĉu la kaŭzo de tiu ŝanĝo estas ekstera (trudo, nepersona forto) aŭ interna (konscia aŭ senkonscia volo, evoluo ktp)" – kaj *ig* estas "sufikso almetebla al ĉiaj radikoj k esprimanta per si mem la *agon de ia kaŭzo* (substreko mia), ne precizigante la manieron, kiel efikas tiu kaŭzo, per peto, ordono, trudo aŭ interna neceseco".

Kiel ni konstatis, la Unuigitaj Nacioj ne estas *unuigintaj* (ŝanĝo de stato), ili havas nur komunan celon (kaŭzon), kiu igas ilin kunligi siajn

fortojn por efektiviĝi tiun komunan celon.

Se ni akceptas, ke la formoj *unuigitaj* kaj *unuigintaj* laŭ gramatika vidpunkto esprimas la saman ideon, (nur unu formo estas aktiva kaj alia estas pasiva), ĉu en tiu kazo ne estos konsilinde apliki regulon pri "sufiĉo kaj neceso", kaj akcepti pli simplan formon *unuigitaj*? Ĝi estas tute *sufiĉa* por esprimi *necesan* ideon! Analogia kazo estas kun la nomo de Usono. Kvankam Usono estas vere *unuigintaj* ŝtatoj "*e pluribus unum*", tamen en Esperanto oni saĝe akceptis simplan formon *Unuigitaj Ŝtatoj*.

Analogio inter UEA, Usono kaj Unuigitaj Nacioj estas tute korekta, kvankam temas pri privata, ŝtata kaj interŝtata organizaĵoj. Unuiĝo kiel jura kazo restas ĉiam la sama, nur la objektoj de la unuiĝo varias.

Tiujn, kiuj ŝatas komparon kun la naciaj lingvoj, mi povas informi, ke en la rusa lingvo *unuigitaj* (kunligitaj por atingi iun komunan celon) estas *objedinjonie*, kaj *unuigintaj* (kunfanditaj, "*e pluribus unum*") estas *sojedinjonie*. La prefiksoj *ob* kaj *so* klare distingigas pri kia unuiĝo temas. Komparu la nomon *Sojedinjonie Ŝtati* por Usono.

Nun pri la mallongigo *UN*. Oficiala nomo estas *United Nations*, do la komencliteroj (mallongigo) estas *UN*. La vorto *organization* vere ne estas parto de la titolo; ĝi nur klarigas, kio *UN* estas. Tial en Esperanto ĝi estas organizaĵo Unuigitaj Nacioj, ne kiel tion oni interpretas Organizaĵo de Unuigitaj Nacioj. Pro tio mallongigo, OUN ne estas ĝusta. La mallongigon *UN* angloj elparolas *jU-eN* (laŭ la angla literumado), kaj en Esperanto ĝi estas elparolata laŭ la Esperanta literumado *U-No* (du silaboj, ambaŭ akcentitaj), sed en skriba aspekto ĝi restas ĉiam *UN*.

UNESCO estas mallongigo – komencliteroj de la vortoj, ĉiam skribita per grandaj literoj, tio signifas, ke post ĉiu litero estas punkto. Nur hazarde ĝi sonas kvazaŭ memstara vorto, tamen tia ĝi ne estas. Oni ne povas ĝin deklinacii nek fari derivaĵojn. Tial oni ne povas ĝin esperantigi, speciale oni ne povas kripligi ĝin esperantigante nur unu literon. Se iu volus esperantigi ĝin, li devas esperantigi la tuton – la plenan nomon kaj konforme al tio la mallongigon. Tiam ĝi aspektus *OUNESK* (prononcata *OUNESKO*), Organizo de Unuigitaj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo. Analogio inter *UNESCO* kaj *kolbozo* tute ne ekzistas. *Kolboz* estas artefarita memstara vorto, kiu estas skribata per malgrandaj literoj, deklinaĵebla kaj derivebla, ankaŭ tradukebla en aliaj lingvoj. Ekzemple *ukraine* ĝi estas *kolbosp*. Ankaŭ analogio kun la nomo *Usono* ne estas ĝusta. *Usono* ne estas esperantigita oficiala mallongigo, kiu estas *USA* (sen *N*). Ĝi estas memstara vorto, skribata per malgrandaj literoj (krom la komenca), deklinaĵebla kaj derivebla. Kreante tiun ĉi vorton oni nur baziĝas sur la oficiala mallongigo. Analogia al *kolboz* kaj *Usono* en Esperanto estas ekzemple *Benelukso*, sed neniam *UNESCO*.

UNESCO estas de la sama kategorio de internacie konataj mallongigoj kiaj *UNRRA*, *IRO*, *NATO*, *CARE*, *YMCA*, *YWCA*. Mi estas scivola kiamaniere oni "esperantigus" ekz. *YWCA*? *UNESCO* estas tiel bone konata, ke neniu misprononcos ĝin. Tamen, se oni volas esti certa, ke estu korekte prononcata – uzante ĝin por la unua fojo en iu artikolo, oni donu klarigon pri la esperanta prononco (*unesko*), kiel tion oni ofte faras skribante fremdajn vortojn.

Ĉi tiujn miajn kelkajn rimarkojn eble oni konsideros, se iu kompetenta instanco volas fine decidi pri tiu bagatela, tamen ĝeniga problemo.

KIU VERKIS FAŬSTON?

EN popollernejo de Orienta Germanujo instruisto riproĉas knabon, kiu petolas kaj malatentas dum la leciono.

"Hans, vi ĉiam nur petolas kaj faras friponaĵojn. Estus pli bone, se vi volus diri, kiu verkis Faŭston!"

"Ne mi." Respondis la konfuzita knabo.

"Ne vi? Rigardu lin! Mi demandas, kiu verkis Faŭston, kaj li respondas, ke ne li! Ĉu vi diros aŭ ne, kiu ĝin verkis?"

"Ho, kamarado instruisto," komencis plori la knabo, "mi ĵuras al vi, ke ne mi verkis Faŭston. Eble tion faris Fritz, ĉar li ĉiuvespere staras antaŭ la drinkejo kaj ĵetas ŝtonojn post preterkurantaj hundoj!"

"Vi estas stultulo! Diru, por ke via patrino venu morgaŭ!"

La sekvintan tagon venis la patrino de Hans, kaj la instruisto plendas al ŝi: "Via knabo estas la plej granda fripono en la tuta lernejo. Ĉiam li nur petolas, ne atentis dum la lecionoj, ne volas lerni. Mi demandas lin, kiu verkis Faŭston, kaj li diras, ke ne li. Kion vi diros je ĉi tio?"

"Kompatu, sinjoro instruisto. Mi scias, ke Hans estas iom tro vigla, sed li ne verkis Faŭston. Li estas tiel malgranda..."

La instruisto nur levis la ŝultrojn pro la naiveco de kamparanino.

Vespere li renkontis vilaĝestron. Post kutimaj frazoj pri la vetero, la instruisto diras: "Kio elkreskos el niaj infanoj? Ĉu vi povas imagi: mi demandas al Hans, kiu verkis Faŭston, kaj li diras, ke ne li. Mi rakontas pri tio al lia patrino, kaj ŝi ankaŭ neas. Kion vi diros pri tio?"

"Jes," respondas la vilaĝestro, "la milito tute malmoraligis homojn. Sed mi persone ankaŭ ne kredas, ke Hans verkis Faŭston. Lia patrino ja simpatiis kun Hitler-movado, sed ŝi ne estis aktiva. Cetere, tio estis jam antaŭ longe."

La instruisto faris rezignacian mansignon kaj adiaŭis la vilaĝestron.

Dimanĉe li renkontis maljunan, jam infaniĝintan pastron. Dum interparolado la instruisto rakontis historion pri Hans, lia patrino kaj vilaĝestro.

"Ho," diras la pastro, "malbonaj tempoj venis. Sed ankaŭ mi ne kredas, ke Hans povis verki Faŭston. Lia patrino estas bona katolikino, ĉiam konfesas al mi..." Tio tute senarmigis la instruiston.

Post iom da tempo vizitis la instruiston rusa sekretpolicano. Li komencis demandi pri la lernejo, progreso de lernantoj, iliaj interesoj pri ĝeneralaj aferoj ktp. La instruisto diplomate informis la policiston pri ĉio, sed por fini la esploradon kaj ĝojigi severan reprezentanton de okupacia registaro, komencis rakonti historion pri Hans: "Ĉu vi povas imagi? Mi demandas al Hans, kiu verkis Faŭston kaj li diras, ke ne li, sed certe Fritz, ĉar li ĉiuvespere staras antaŭ la drinkejo kaj ĵetas ŝtonojn post preterkurantaj hundoj. La patrino de Hans ankaŭ diras, ke ŝia filo ne faris tion ĉar li estas ankoraŭ malgranda. La vilaĝestro asertas, ke kvankam la patrino de Hans simpatiis kun Hitler-movado, tamen Hans ne verkis Faŭston. Ankaŭ la pastro defendas la knabon, dirante, ke lia patrino estas bona katolikino, konfesas al li, do li sciis pri ĉio. Ĉu ne estas interese?"

"Hm... Vere interesa kaj pristudinda historio," respondis enpenseme la sekretpolicano.

Post unu semajno la policisto denove vizitis la instruiston kaj ĝoje

diras: "Ĉu mi ne diris, ke estas interesa historio kun tiu Faŭsto? Aŭdu! Mi arestis Hanson, lian patrino, Fritzon, drinkejstron, vilaĝestron kaj pastron. Ili unue ĉion neis. Sed post iom da argumentado miaflanke, kaj kiam ili ekvidis, ke havas en la manoj sufiĉe fortan konvinkigan materialon, ili konfesis, ke ili ĉiuj kune verkis Faŭston laŭ ordono de Vatikano, por transdoni ĝin al Amerikanoj. Agis kun ili ankaŭ iu Goethe el Weimar, sed ni ne sukcesis trovi lin. Certe li, hunda filo, jam forkuris Okcidenten."

— M. M.




La mondfama gazeto "LIFE" denove uzis Esperanton en letero al nepagintoj. Ĝi komenciĝas angle: "Eble mi ĝis nun ne parolis vian lingvon — do..." Tuj sekvas paragrafo Esperante: "Estas la dektria semajno, ke ni sendas la revuon LIFE al via hejmo de kiam vi sendis al ni vian reabonon — kaj estas la dektria semajno, ke la fakturo por tiu reabono restas nepagita." Post tio estas la angla traduko, kio komenciĝas per frazo pri "Esperanto... la universala lingvo." Kaj la letero finiĝas per afabla frazo: "Mi dankas vin." — angle kaj Esperante.

Sveda Esperanto-Federacio anoncis, ke la prelegsemajno en Frostavallen, Svedujo, dumsomere 1953 bone sukcesis. La prelegserio okazis sub la aŭspicio de la Federacio kaj la Sveda Konsilantaro por UNESCO. Nova prelegserio estas planita por 1954 de la 8-a ĝis 15-a de Aŭgusto. Personoj, kiuj havas intereson partopreni — aŭ prelege aŭ aŭskultante — bonvolu peti plian informon de la Centra Oficejo de EANA.

S-ro Frans Van Dooren, kiu frutempe estis estro en Flandra Esp-Ligo, Belgujo, vizitis la Centran Oficejon dum sciencaj vojaĝoj en Usono.

David W.M. Jenkins: —



KRISTNASKO

Saĝuloj vidis signon en ĉiel' —
La brilojn belajn de la matenstel—
Kaj elkomprenis en la sankta hor',
Ke estas naskiĝinta la Sinjor'.

En landon orientan venis Li,
Sendato de Perfekta Harmoni';
Li venis ĉar la tuta mondomar'
La celon havas iĝi mondfratar'.

Ni penu ĉiutage pli kaj pli
Memori ke ekzemplon donis Li.
La Stelo de Espero gvidu nin
Ĝis ni eklernos kiel sekvi Lin.

ESPERANTO - KRONIKO

En la ĵurnalo "Sunday Call-Chronicle", Allentown, Penn., la 18-an de Oktobro aperis granda artikolo pri Esperanto kaj pri nia samideano *Donald Munro*. Bela foto montras S-ron Munro dum li legas libron.

Japana instruisto, *S-ro Keničiro Doi*, membro de grupo de "interŝanĝ-instruistoj" vizitis Esperantistojn en Washington, D.C., en Aŭgusto.

Komenton pri la 43-a Kongreso de EANA sendis *F. Lee York* jene: "Neniam mi forgesos la mirindan sperton ĉeesti la Kongreson. Mi estas pli kaj pli inspirata per tiu memoro por ĉiutage labori pli kaj pli diligente por nia interlingvo." S-ro York raportas, ke je la momento li havas 55 korespondantojn en 45 urboj kaj 15 landoj.

Dua filino, Mary Elizabeth, naskiĝis al la familio *Vigelis* en Long Beach, Kalifornio. La patrino, *S-ino Adeline Vigelis*, estas membro de la Estraro de EANA. Nova Esperantistino en la familio, ni esperas!

Antaŭ la Rotaria Klubo en Newark, N.J., la 17-an de Septembro, *Donald Walton* parolis pri Esperanto. La ĉeestantaro poste plenigis demandaron pri Esperanto, kiun S-ro Walton distribuis.

Tri Esperanto-kursoj komenciĝis lastatempe en Washington, D. C.: por komencantoj dufoje semajne en la konstruaĵo de la Pan American Union, gvidanto *Reed J. Irvine*; por progresantoj ĉiun duan merkredon sub gvidado de *Henri Soudée*; kaj por rondo de librolingvanoj ĉiun duan jaŭdon kun helpo kaj gvidado de *Ernest G. Dodge*.

En la Klubo Kiwanis de la Valo Spokane, *Pastro Ray W. Mason* donis interesan paroladon pri Esperanto. Ĉeestis 30 viroj, kiuj atente aŭskultis lian duon-horan klarigon pri la interlingvo.

La Esperanto-Grupo de Vancouver, B. C., raportis, ke ĝi komencis sian novan agadjaron en Septembro. Novaj estraranoj estas elektitaj: Prezidanto, *W. J. Maier*; Vic-Prezidanto, *Ray Perran*; Sekretario, *Jessie Forrest*; Programoj, *Alice Maier*. La grupo okazigas stud-grupon ĉiusemajne sub la gvidado de *Gustav Carlson* kaj *Ray Perran*.

Leteroj al Redaktoroj pri Esperanto aperis lastatempe en la sekvantaj ĵurnaloj: *The Montclair Times* kaj *Newark Evening News*, subskribis *S-ino Marc Denton*; *Globe & Mail*, Toronto, kaj *North Toronto Herald*, rezulte de la senlaca informlaboro de nia samideano *W. D. B. Jenkins*.

Tosa Rondo Esperanto estas la nomo de nova Esperanto-Klubo en altlernejo, Wauwatosa, Wisc. *S-ro Jarvis E. Bush*, instruisto de angla literaturo en la lernejo, tre sukcese organizis grupon de gejunuloj por studi la interlingvon. Je la 3-a de Novembro S-ro Bush paroladis pri Esperanto antaŭ studenta grupo de Mondfederalistoj kaj elvokis tiom da entuziasmo, ke dum la sekvanta semajno 34 gejunuloj kunvenis sub lia gvido por fondi novan grupon. S-ro Bush interesiĝis pri Esperanto antaŭ dudek jaroj. Li skribis: "Neniam mi forgesis ĝin, kaj kiam mi vidis ekzempleron de *AE* dum frua somero, mi kore renovigis mian intereson." Tio montras, kiel grave estas disvastigi la gazeton *AE*, speciale inter bibliotekoj.

La Esperanto-Societo de Nov-Jorko komencis regulan programon de kunvenoj dufoje monate. Dum la dua kunsido, la 24-an de Oktobro, parolis *D-ro W. Solzbacher* pri sia Esperantista vojaĝo tra Eŭropo kaj pri siaj spertoj en Jugoslavujo. Eksterlanda gasto por la vespero estis *S-ino Marion Newell* el Anglujo. La 5-an de Novembro parolis *Harold Isele* pri sia aŭtuna vizito al Anglujo. La 21-an de Novembro parolis *G. Alan Connor* pri la temo "Esperanto kaj Projektoj – Nova Vidpunkto".

Nova kurso de Esperanto komenciĝis en Oktobro en la McBurney YMCA, New York, sub aŭspicio de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko kaj EANA. La kurson gvidas sperta instruisto *Ray Kelly*.

Roy E. Holland, instruisto en Naperville, Illinois, gvidas novan kurson de Esperanto en sia atlernejo. Ses junulinoj kunvenas semajne por studi la interlingvon. Ili jam komencis internacian korespondadon.

Revene de Internacia Fiziologia Konferenco en Montreal, vizitis la Centran Oficejon de EANA *D-ro Tetuo Mineŝita* el Osaka, Japanujo. *D-ro Mineŝita* antaŭ la milito estis profesoro de Farmacio en la Universitato de Manĉurio. Li lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj.

Esperanto-Klubo en Kolegio Brooklyn fondiĝis antaŭnelonge pro iniciato de *Eugene Albert*. Grupo de dudek studentoj kunvenas ĉiusemajne por studi la interlingvon.

La Esperanto-Klubo de Toronto raportas, ke regulaj kunvenoj de la klubo por la nova sezono komenciĝis en Septembro.

Pastro Gabriel N. Pausback, O. C., faris paroladon pri Esperanto la 4-an de Oktobro antaŭ cent dudek-kvin personoj (studentinoj, instruistinoj, monakinoj) en la kolegio St. Xavier, Chicago. Kuraĝiga rezulto estas, ke la Klubo pri Internaciaj Rilatoj en la Kolegio konsideras la eblecon elekti Esperanton kiel sian stud-objekton de la venonta jaro. Pastro Gabrielo promesis sian helpon tiurilate.

Joseph R. Scherer, Prezidanto de la Esperanto-Klubo Los Angeles, estas reelektita por naŭ pliaj jaroj al la *Akademio de Esperanto*. Ni kore gratulas lin!

Edward Kalmar, novalveninto al Usono el Polujo, faris bonan propagandon por Esperanto en Los Angeles. Li ja estas la persono, kiu aperis en la fama televida programo "House Party" de Art Linkletter kaj klarigis kiel Esperanto savis lian vivon (vidu paĝon 83 de ĉi tiu n-ro de AE). S-ro Kalmar unue rakontis sian historion en intervjuo kun la ĵurnalo "Los Angeles Times", kiu je la 18-a de Oktobro publikigis lian bildon kaj grandan artikolon pri liaj spertoj en Polujo dum la milito kaj poste sub la komunista regado. Rezulte de la artikolo, S-ro Kalmar ricevis inviton esti gasto ĉe la supremenciita radio- kaj televido-programo, kiu vidiĝas pere de 45 televido-stacioj kaj 180 radio-stacioj tra la tuta Usono.

En la Program-Folio 1953-1954 de la McBurney YMCA, New York, aperis mencio pri la Esperanto-Societo, kiu regule kunvenas tie. Oni legas ankaŭ la admonon "Parolu kaj lernu la internacian lingvon". La Programo estas sendata al granda nombro da personoj en New York.

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.

Hispanujo. José M. Terradellas, San Pedro Moyá, Barcelona. Dez. kor.
Japanujo. Sakae Mutoo, 2 Chome, Omama, Yamada-gun, Gumma. 20-jara studento deziras korespondi.

Svislando. Marcel Erbeta, Rue des Pins 66, Bienne 7. Instruisto petas korespondantojn por 9-jaraj geknaboj en lernejo.

Usono. C. Thomas Irwin, P. O. Box 461, Brooksville, Florida. Ateisto deziras korespondi kun tutmondaj ateistoj kaj liberpensuloj.

Valeo, Zilverberg 16, Rumbeke near Roulers, Belgium. Belga samideano Van Loocke inventis absolute perfektan aparaton por la seksdifino de kokidoj. Gesamideanoj en Usono kaj Kanado bonvole transdonu supran adreson al specialistoj pri "Chicken Testers". Senpagaj informoj en Esperanto, angla kaj franca lingvoj.

Internacia Poŝtkart-Servo: Errol Pritchard, AE-111, 735 East 38th Ave., Vancouver 15, B. C., Canada. Ni interŝanĝas PK jene: Sendu 2 uzitajn, ricevu 1 uzitan; sendu 2 novajn, ricevu 1 novan; sendu 3 uzitajn, ricevu 1 novan; sendu 2 novajn, ricevu 3 uzitajn. Poŝtkartoj de ĉiuj landoj vendataj. Plenan informon ni sendos kontraŭ unu internacia respond-kuponon.

EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1954

The Central Office has enjoyed serving the members of EANA during the past year. It is now time for many of you to renew your membership for 1954. For us, your early remittance will greatly aid in keeping records, and will avoid extra office work in sending out reminders. For you, an early reply assures you of continued privileges of membership and receipt of the AE Magazine.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "associate membership" in the international association UEA. You receive coupons (called "membromarkoj") of UEA, and have a right to services of delegates throughout the world.

In addition there are "individual membership" categories in UEA: the *Yearbook* (containing lists of delegates) is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually.

Now is the time for you to renew your membership in your North American association EANA, and in the general international association UEA. Here are the combined membership rates for 1954:

| | <i>Armed Forces, H.S. & College</i> | <i>Active Member</i> | <i>Patron Member</i> |
|--|---|--------------------------|--------------------------|
| EANA Membership & associate of UEA: | \$3.00 | \$5.00 | \$10.00 |
| EANA Membership & <i>Yearbook</i> of UEA: | \$4.25 | \$6.25 | \$11.25 |
| EANA Membership with <i>Yearbook</i> and magazine <i>Esperanto</i> of UEA: | \$6.00 | \$8.00 | \$13.00 |

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

- PRACTICAL ESPERANTO**, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated..... \$.25
- REED'S PRACTICAL GRAMMAR**, Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price..... .35
- ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE**, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....Paper \$1.50; Cloth 3.00
- UNIVERSALA ESPERANTO-METODO**, Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....Cloth 6.00
- ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY**, Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....Cloth 1.50
- ESPERANTO (World Language Series)**, Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc..... .25
- WORLD'S CHIEF LANGUAGES**, Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....Cloth 6.00
- AMERICAN POCKET DICTIONARY**, Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp..... .25
- EDINBURGH DICTIONARY**. Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....Cloth .85
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....Cloth 2.50
- FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**. Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....Cloth 2.35
- PLENA VORTARO DE ESPERANTO**, Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....Cloth 4.00
- Rare, exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....Cloth 6.50
- FUNDAMENTA KRESTOMATIO**, Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....Paper 1.65
- Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....Half-Cloth 2.50
- KARLO**, Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp... .25
- THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)**. The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....Cloth 2.50
- ESPERANTO SORTIMENTO**. Five books, good reading at low cost: *Akrobato de Nia Sinjorino*, legend of France, 25 pp; *Blanche-Virgulino de Lille*, medieval romance, 42 pp; *Lando de Argenta Akvo*, story of Far West, 48 pp; *Miserere*, music story, & *Tbais*, by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; *Rozujo Ciujlarja*, the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only..... 1.00
- RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS**. Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusia, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection... 2.75
- INDIAN BEAD STAR**. Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch.. 1.00
- GREEN STAR PENDANT**. Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia... .75
- ENAMEL GREEN STAR**. Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch.. .65
- On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch... .65
- On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch.... .65
- On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only..... .65

Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.